

# D-ro L.L. ZAMENHOF KAJ POLLANDO

Kvankam kiel konate Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917) ne estis polo, sed (ruslanda, aŭ litova) judo, liaj vivo kaj laboro estis intime ligitaj kun la tero de (iama) Pollando, kiu inter 1815 kaj 1918 estis protektorato sub cara regado. Ekde 1795 Pollando ne nur perdis sian ŝtatan suverenecon, sed en 1867 eĉ sian nomon, kvankam laŭ la Viena Kongreso de 1815 ĝi estis ‚Pola Reĝlando‘, kun propra konstitucio. Pro diversaj ribeloj kaj civila malobeo flanke de la pola gento, la cara reĝimo reduktis pli kaj pli la liberecojn en sia protektorato. Do, oni devas diri, ke en la vivotempo de Zamenhof Pollando en senco de la internacia juro tute ne plu ekzistis, ĝi estis fora historio, la poloj estis nacio sen ŝtato, kaj la judoj, kies intencita emancipiĝo (aŭ asimiliĝo) fiaskis, vegetis kiel perdita nacia minoritato en malfacila situacio inter poloj kaj rusoj kaj aliaj gentoj. Dum la vivotempo de Zamenhof, kiu eksplicite rifuzis aparteni al la pola gento, do ekzistis sole Ruslando, la Cara Imperio kaj poloj, judoj, rusoj, ktp., kiuj ne estis liberaj civitanoj, sed regatoj de la rusa caro. Bjalistoko, Krakovo kaj la sileziaj kuraĉlokoj, kiujn Zamenhof vizitis, dum lia vivotempo troviĝis ekster tiu ‚Kongresa Pollando‘, kie Zamenhof loĝis inter 1873 kaj 1917. La ŝtatan sendependiĝon de Pollando en 1918 li ne plu travivis, ĉar li mortis unu jaron pli frue. La sekva studo celas rakonti kion Zamenhof faris en ĉiuj tiuj lokoj, kiuj nuntempe estas integra parto de Pollando.

## Bjalistoko

Sendube, la unuan rangon en la hierarkio de lokoj kun grava signifo por la frua pensmaniero de L.L. Zamenhof posedas Bjalistoko, kie la kreinto de Esperanto kaj de la homaranismo naskiĝis en 1859 kaj kie li vivis kun siaj gepatroj kaj kelkaj gefratoj ĝis 1873 (kiam oni translokiĝis Varsovion). Sub la impreso de la streĉita etoso de intergenta malamikeco ekestis ĉe LLZ la ideo, ke necesas krei internacian lingvon (kaj religion) por solvi la problemon de la intergenta malamo, antaŭ ĉio por solvi la problemon de la juda gento mem. Por ‚Bjalistoko‘ staras do la simbolo de la internacilingva ideo en la konscio kaj menso de la apogantoj, defendantoj kaj propagandantoj de tiu nobla ideo. En sia letero al Borovko (publikigita en 1896) Zamenhof skribis pri Bjalistoko: „Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj.“ Sur la strato kaj en la korto li sentis, ke homoj ne ekzistas, sed sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis lian infanan animon. Plue li notis en la sama letero, ke la revon pri unu homa lingvo li neniam povis forĵeti. Sufiĉe frue ĉe li formiĝis la konscio, ke la sola lingvo povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la vivantaj nacioj. Ŝajnas, ke la lingvojn germanan kaj francan li lernis en la bjalistoka infaneco, kiel li skribis al Borovko. En Bjalistoko li lernis (denaske) ankaŭ la jidan (patrina kaj kvartala lingvo), kaj la hebrean (sinagogo), dum la rusa lingvo estis la lingvo de la patro, lernejo kaj ŝtato).

Sekvas ĉerpajo el la nomita letero de Zamenhof al Borovko pri lia tempo en Bjalistoko:

*„Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkigas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj k.t.p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multoj eble ridetos pri tiu ĉi "doloro pro la mondo" ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la "grandaĝaj" posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.*

*Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ne ĉio fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al la infano; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉia okazo sufiĉe frue, ce mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniuj el la nun vivantaj nacioj.“*



Iama „Zamenhof-strato“ en Bjalistoko kaj la naskiĝdomo de L.L. Zamenhof

## Varsovio

En 1873 la familio Zamenhof translokiĝis de Bjalistoko al Varsovio, kie la patro Marko ekokupis gravajn postenojn. En Varsovio la lingvaj kaj ideologiaj planoj de Zamenhof firmiĝis kaj konkretiĝis. La restado de L.L. Zamenhof en Varsovio inter 1873 kaj 1917 povas esti distingita laŭ kvar periodoj.

## Unua varsovia periodo

Dum kelka tempo LLZ estis forlogata de lingvoj antikvaj. Poste li venis al la firma konvinko, ke tio ĉi estas neebla, kaj li komencis malklare revii pri *nova*, arta lingvo. Li ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis artifikajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, ktp. Sed homa lingvo kun senfina amaso da gramatikaj formoj kaj kun ĝiaj centmiloj da vortoj, per kiuj timigas la dikaj vortaroj, ŝajnis al li tia artifika kaj kolosa maŝino, tiel ke li revenis al si origina revo pri arta lingvo. Antaŭ ol eniri la gimnazion la knabo lernis hejme la lingvojn latinan kaj grekan (Michaux, 21.2.05). En la 5a klaso gimnazia li komencis lerni la anglan lingvon, kies gramatika simpleco frapis lian atenton. Li komprenis, ke la riĉeco de la gramatikaj formoj estas nur kaprica historia hazardo, sed ne necesa por la lingvo. Sub tia influo li komencis forĵetadi en la lingvo ĉiujn senbezonaĵajn formojn, kaj baldaŭ li venis al gramatiko plej malgranda de ne pli ol kelkaj paĝoj. En la 6a aŭ 7a klaso, do ĉirkaŭ 1876, Zamenhof atentis surstratan subskribon ‚*Ŝvejcarskaja*‘ (ĉi tiu rusa vorto signifas pordistejon), kiun li multfoje vidadis, kaj poste ankaŭ la elpendaĵon ‚*Konditorskaja*‘ (konditorejo). Tiu ĉi skaja ekinteresis lin kaj montris al li, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis lin tute kaj li trovis la solvon la problemon kiel liberigi la dikajn nacilingvaj vortarojn kvazaŭ de ĉia balasto. Li komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage li forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. La meĥaniko de la lingvo estis al li revelaciita, kaj li jam trovis antaŭ si la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron de la nova lingvo. Pri la trajtoj de logika-filozofia (aprioria) lingvo, kiujn li ankoraŭ prikonsideris, li baldaŭ rezignis, ĉar la provoj kun si mem montris al li, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile lerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Ankaŭ li konvinkiĝis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-

germana, ŝanĝita nur tiom, kion ĝin postulas la reguleco kaj aliaj grabaj kondiĉoj de la lingvo. En tio li ĉerpis la internaciajn vortojn el la ekzistantaj lingvoj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj kiuj faras la terzoron por estonta lingvo internacia.

Zamenhof:

*„Kiam el la Bjelostoka reala lernejo (tiam ĝi estis ankoraŭ gimnazio) mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturados en la tuta mondo kaj per flamaj paroloj inklinados la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas neebbla, kaj mi komencis malklare revii pri nova arta lingvo. Mi ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis artifikaĵajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, k.t.p. Sed homa lingvo kun ĝia, kiel ĉajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun ĝiaj centoj da miloj de vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tia artifika kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diradis al mi: "for la revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj", -- kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.*

*Germanan kaj francan lingvojn mi ellernadis en infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio, mi komencis ellernadi lingvon anglan, la simpleco de la angla gramatiko ĵetiĝis en miajn okulojn, precipe dank' al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝi al mia revo. Sed la grandegulaj vortaroj ĉiam ankoraŭ ne lasadis min trankvila.*

(...)

*La problemo estas solvita!" -- diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstatauxigante tiun cxi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure radikaj (ekz. "patrino", "mallarĝa", "tranĉilo" k.t.p.) povas esti facile transformitaj en vortojn formitajn kaj malaperi el la vortaro. La meĥaniko de la lingvo estis antaux mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.“*

En la jaro 1878 la lingvo nomata „lingwe uniwersala“ estis pli malpli preta, kaj li komunikis la kreaĵon al siaj kolegoj (li estis en la 8a klaso), kaj la 5an de decembro okazis la „solena sanktigo“ de tiu lingvo en sia ĉambreto en la loĝejo de la domo ĉe Nowolipie 28. Tiam aperis la konata strofo:

Malamikete de las nacjes  
Kadó, kadó, jam temp' está!  
La tot' homoze in familje  
Konunigare so debá

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo, kaj por publikigi ĝin li voiks ankoraŭ atendi kelkajn jarojn. Prokraston de la publikigo de la ideo kaŭzis ankaŭ la kredo, ke la lingvo estos utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos.

En aŭgusto 1879 Zamenhof finis la gimnazion kaj forveturis studi al la moskva universitato. (laŭ letero al Borovko, 1896). En 1880 li verkis provon de gramatiko de la novjuda lingvo. Inter somero (aŭ aŭtuno) 1879 kaj somero 1881 LLZ restadis en Moskvo por studi medicinon. Moskvo ludis certan rolon por la cionismo kaj homaranismo de Zamenhof.

Pri la periodo post la apero de „linge uniwersala) kaj la studento tempo Zamenhof skribis al Borovko.

*„Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraux 5-6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Post duonjaro post la festo de 5-a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri "nova lingvo" kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5 1/2 jaroj de mia estado en universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo - la jaroj de studento - pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafoje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo, sopiris kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo, prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj ("Mia penso") mi metis poste en la unuan eldonitan de mi broŝuron; sed al la legantoj, kiuj ne sciis, ĉe kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi ekŝajnis, kompreneble, stranga kaj nekomprenebla.“*

## **Dua varsovia periodo**

Post la reveno el Moskvo en aŭgusto 1881 la adoleskanto daŭrigis siajn medicinajn studadojn en Varsovio, okupiĝis pri cionismo, konatiĝis kun Klara Zilbernik. Al Michaux (21.2.05) li skribis, ke longan tempon en sia juneco li estis varmega ‚sionisto‘ (sic) kaj ke li estis unu el la unuaj pioniroj de tiu ĉi ideo kaj ke tiam liaj sampopolanoj forte mokadis lin, kiam li kun juna flameco kaj profunda kredi paroladis al ili pro la rekonstruo de la Palestina hebrea regno. Li laboris energie por tiu ideo, fondante unuajn grupojn cionistajn. En la revuo *Razsvet* li publikigis du artikolojn pri la juda demando. Lige kun tiu agado LLZ konatiĝis kun la elstara cionisto Nahum Sokolov (kiu montriĝis kontraŭanto de Esperanto). Sed post 3-4 jaroj de energia laborado por la cionismo li venis al la konvinko, ke tiu ĉi ideo kondukos al nenia celo kaj tial li forĵetis la ideon, kvankam en la *koro* ĝi restis por li ĉiam kara, kiel agrabla kaj neplenumbla revo. Kiam en 1897 aperis la cionista movado de Herzl, li jam ne povis aliĝi al ĝi.

Post tio sekvis restadoj en Veisiejai kaj Vieno. En 1885 lia prilaborita lingvo ŝajnis esti preta:

Zamenhof al Borovko:

*„Dum ses jaroj mi laboris perfektigante kaj provante la lingvon, kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke la lingvo jam estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. (...). La praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan "ion", la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan ´spiriton´.*

Kaj: *„Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: "via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo". Sed ĉar la "mondo" ne estas ebla sen antaŭaj apartaj "unuoj", la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam prosperos fari ĝian utilon por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu jam estas la lingvo akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, kiuj ne postulas, ke la mondo antaŭe ilin akceptu, kaj donas al tute nedediĉita adresato la eblon kompreni*

*ĉion skribitan de vi, se vi nur transdonas al la adresato la sŝlosilon, - alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia "ŝlosilo", kiu, enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabete orditaj elementoj, donus la eblon al la tute nedediĉita adresato de kia ajn nacio tuj kompreni vian leteron.*“

Sed Zamenhof ne trovis eldoniston, kiun li serĉadis dum du jaroj. Unuafoje en sia vivo LLZ spertis la finanĉan problemon, kiu akompanados lin ankaŭ poste kaj venas lian vivon, kiel li skribis (Letero al Borovko, 1896). En tiu periodo li ekstudis oftalmologion en Varsovio.

## **Veisiejai kaj Plock**

Post sukcesa fino de la universitata studado en januaro 1885 kaj la promociado kiel kuracisto du monatojn poste sekvis profesia praktikado en la provinca urbeto (aŭ vilaĝo) Wiejsieje en la gubernio de Suwałki, kiun la litovoj nomas Veisiejai. Ĝi troviĝis en la plej nordorienta parto de la Pola Reĝlando sub cara protekto. Tie, kie loĝis parencoj (fratino Fania kun edzo Pikower), LLZ faris la amaran sperton, ke li ne taŭgas por ĝenerala praktikado kiel kuracisto. Krom tio li ŝajne estis iom ŝokita pro la konservemeco kaj superstiĉeco de la loka popolo. En Veisiejai li prilaboris sian lingvoprojekton. Kovno, de kie devenis lia edzino Klara Zilbernik kaj kie Zamenhof mem estis kelkfoje, troviĝis aliflanke de la limo, do jam ne apartenis al Kongresa Pollando.

Fine de 1885 Zamenhof veturis al Plock, iom nordokcidente de Varsovio. Ĉar ankaŭ tie li faris la saman negativan sperton kiel en Wiejsieje, li komplete rezignis pri ĝenerala kuracista praktikado. En majo 1886 li veturis al Vieno por akiri konojn en oftalmologio por poste labori kiel okulkuracisto en Varsovio.

## **Tria varsovia periodo**

La ĉefa evento por LLZ dum tiu periodo estis la publikigo de la Lingvo Internacia (Esperanto) en 1887 (tiam LLZ loĝis ĉe strato Muranowska 40). Li sentis, ke li staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos lia broŝuro (t.e. la Unua Libro), mi jam ne havos la eblon reiri, kiel li notis en sia letero al Borovko. En tiu periodo li faras negativan sperton kun la ege pedanta cenzura praktikado en Ruslando, kaj rilate liajn proprajn eldonaĵojn kaj rilate la problemojn, kun lia patro havas kun la cenzuro.

La cirkonstancojn de tiu tempo Zamenhof priskribis al Borovko jene:

*„Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro ("D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro") kaj komencis serĉi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo, la finanĉan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj fine rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je "flankaj aferoj"; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj ... mi transiris Rubikonon.*“<sup>1</sup>

---

<sup>1</sup> La plenan tekston de la Letero al Borovko vd. sub <ftp://ftp.stack.nl/pub/esperanto/esperanto-texts.dir/borovko1.txt>

La *Unua Libro* estis presita de la presejo Ch. Kelter en Varsovio, Nowolipie-Str. 11. Pri la aventuroj kun la rusa cenzuro aliloke en la literaturo troviĝas priskribo.

En novembro 1889 Zamenhof forveturis al Ĥerson (suda Ukrainio), de kie li revenis al Varsovio en majo 1890 (strato Nowolipki 21). En oktobro 1893 li translokiĝis al Grodno, kie li restadis ĝis 1897.

### **Kvara varsovia periodo**

Post Grodno la Zamenhofoj ekloĝis en Varsovio ĉe la strato Dzika 9 - ekde julio 1915 ĉe la strato Królewska 41). Fine de 1904 formiĝis la Varsovia Societo E-ista, en kiu ludis gravan rolon Antoni Grabowski, Leo Belmot, Adam Zakrzewski, Aleksandr Brzostowski kaj aliaj. La ĉefurbon Zamenhof forlasis nur inter 1905 kaj 1914 por kelkaj semajnoj por viziti la Universalajn Kongresojn de Esperanto en diversaj landoj kaj por restadi en diversaj kuraclokoj en Germanio. En tiu periodo li prilaboradas sian hilelismon-homaranismon (1901, 1906, 1913, 1917) kaj fakte pensadas nur pri tio kiel efektiviĝi ĝin. Sed en sia kvara varsovia periodo aperis ankaŭ traktaĵoj kiel *Gentoj kaj Lingvo Internacia*, direktita al la Kongreso de Rasoj (1911), la ideo organizi kongreson de neŭtrala-homa religio (1913) kaj la alvoko al la diplomatoj *Post la Granda Milito* (Li volus proponi ĝin dum la esperantistaj kongresoj, sed oni malrekomendas al li publike paroli pri la homaranismo, por ne endanĝerigi la projekton de la neŭtrala lingvo.) Sur lia skribotablo oni trovis meditaĵon pri Dio kaj pri senmorteco.



Laborĉambro de L.L. Zamenhof en Varsovio, str. Dzika 9

### **Krakovo**

Al Krakovo L.L. Zamenhof veturis en 1912 por partopreni la 8an Universalan Kongreson de Esperanto. Krakovo tiam troviĝis en la de Aŭstrujo-Hungarujo aneksita parto de la iama Pollando, do la imperiestro Francisko Jozefo I. , kiu estis samtempe Grandduko de Krakovo, estis ĝia suvereno. Apud Varsovio Krakovo estis unu el la centroj de la pola liberiga movado.

Por kongresi fakte oni pensis pri Varsovio, kie loĝis la aŭtoro de Esperanto kaj kie indus festi la 25an datrevenon de la publikigo de Esperanto. Sed Varsovio troviĝis en la rusa parto, kien enveturi estis komplike kaj kie okazis severa cenzuro, sen kies rigora praktikado publikaj kunvenoj ne povis okazi. Ankaŭ en la prusa sektoro la situacio ne estis pli favora. Tial oni preferis Krakovon, kie la reĝimo estis plej libera. Al Krakovo Zamenhof veturis kiel kutime kun sia edzino Klara, kaj kun filino Sofio kaj frato Aleksandro, kie oni alvenis la 9an de septembro. Frato Felikso alveturis per alia trajno.

Ĉar Zamenhof rifuzi ricevi ĉian honorigon dum la kongreso, li avertis la LKKn en letero de la 14a de februaro, ke „Vi elĵetu el la programo ĉion, kio povas havi ian rilaton al mia persono. La kongreso devas esti jubileo nur de Esperanto, ekskluzive nur de Esperanto, sed neniom okupi sin pri ĝia aŭtoro.“ Ĉi tiu letero famiĝis ankaŭ pro tio, ke en ĝi la rifuzis apartenon al la pola popolo: „„En la kazo, se Vi nepre bezonos paroli pri mia persono, Vi povas moin nomi „filo de pola lando“ (ĉar neniu povas nei, ke la tero, en kiu kuŝas ambaŭ miaj geaptoj kaj sur kiu mi konstante laboras kaj intencas labori ĝis mia morto, estas mia hejmo, kvankam mi ne estas naciisto), sed ne nomi min ‚polo‘ por ke oni ne diru, ke mi – por akcepti honorojn – metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas. Ĉar, por eviti ian malĝustan paŝon, Vi eble bezonas scii, al kiu popolo mi *mem* alkalkulas min, mi sciigas Vin, ke laŭ mia politika-religia *konvinko* mi estas nek polo, nek ruso, nek hebreo, sed mi estas partiano de ‚homaranismo‘ (ne miksku kun ‚kosmopolitismo‘); laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento *hebrea*.“

En la krakovo kongreso, kiun ĉeestis milo da personoj el trideko da landoj, Zamenhof prezentis sian faman ‚adiaŭan paroladon‘, dirante inter alie jenajn frazojn:

*„Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al la esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn ‚tion mi postulas‘ aŭ ‚tion mi deziras‘. Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi — lau via deziro — dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon.*

*Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur inter vi.“ Kaj lio detale klarigis la kaŭzojn por tiu decido kaj kial la Esperanto-movado ne devus havi majstron. „Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu ‚majstro‘, ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.“*

*Kun la konscio, „ke multajn el vi mia nuna parolo malagrabla senluziigos“, li aldonis, ke ne temas pri cigna kanto, sed „ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena“ kaj kortuŝis la ĉeestantojn per jenaj vortoj: „Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokajn malamajn kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn.“<sup>2</sup>*

La komentanto Dov Ber Borohov, korespondanto de la novjorka juda gazeto ‚Di Varhajt‘, esprimis la opinion, ke Zamenhof demetis de si la rolon de la spirita gvidanto de la movado ne nur pro tio, ke li

---

<sup>2</sup> Tekston de la krakova kongresa parolado de Zamenhof vd. sub <http://esperantio.narod.ru/lingve/zajxoj/parolo8.htm>

malŝatis la kulton de personeco, sed ankaŭ pro tio, ke iuj homoj negative rilatis al Esperanto pro la judeco de ĝia aŭtoro.<sup>3</sup>

La kongresa ekskurso kondukis Zamenhof al la salminejo de Wieliczka, kaj post la kongreso li forveturis al Zakopane en Altaj Tatroj por ripozi kaj ĝui la bonan aeron.  
Sileziaj kuraclokoj

Ĉar Zamenhof de frua aĝo malsanis je asteriosklerozo kaj ĝenerale havis malfortan sanon kaj fragilajn nervojn, li devis kuracelle ripozi de tempo al tempo. Tion li faris en diversaj kuraclokoj de Germanio. Du el ili troviĝis en Malsupra Silezio: Bad Reinerz apud Glatz (nun Duszniki Zdrój apud Kłodzko), kaj en Bad Salzbrunn apud Waldenburg (Szczawno Zdrój apud Wałbrzych, sudoriente de Vroclavo).<sup>4</sup> En Bad Reinerz Zamenhof restadis plurfoje: en aŭgusto kaj septembro 1906 antaŭ kaj post la ĝeneva kongreso. Antaŭ la kongreso li devis esti tre nervoza, ĉar li hezitis veturi al Svislando pro la homaranisma disputo. En 1908, Zamenhof denove vizitis Bad Reinerz post sia longa vojaĝo al Dresdono kaj Kopenhago. Antaŭ sia vizito de la oftalmologo Henri Dor en Liono (Francio) en aŭgusto 1909 Zamenhof haltis en Bad Reinerz, kaj revene de la streĉa vojaĝo al la kongreso en Barcelono sekvis nova restado en tiu preferata kuracloko. Preskaŭ la tutan monaton junio de 1912 Zamenhof pasigis en Bad Salzbrunn. Poste en tiuj kuraclokoj aperis memoraĵoj lige kun la restado de Zamenhof. Cetere, Zamenhof vizitis aliajn kuraclokojn kiel Bad Nauheim, Bad Kissingen, und Bad Neuenahr, kiuj troviĝis en okcidenta Germanio.

Pri la poloj Zamenhof kiel judo havis ambivalentan sintenon. El pluraj citaĵoj en lia verkaro ni scias, ke li strikte distancigis sin de la poleco. En sia Hilelisma analizo de 1901 li prezentis la konvinkon, ke judoj neniam povus fariĝi poloj, kaj ke en certaj polaj rondoj oni renkontas antisemitisman modelon.

Por pli bone kompreni kial Zamenhof reprezentis tian rigoran sintenon, necesus klarigi la historion de la polaj-judaj rilatoj ekde la mezepoko ĝis la fino de la 18a jarcento kaj precipe en la 19a jarcento ĝis 1917.

© Andreas Künzli 2013/16

---

<sup>3</sup> Vd. <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/zamen.html>

<sup>4</sup> En Duszniki Zdrój s. [http://www.pomnikowo.eu/strony/p\\_dslaskie\\_pozostale.html](http://www.pomnikowo.eu/strony/p_dslaskie_pozostale.html) und Szczawno Zdrój s. <http://www.polskaniezwykla.pl/pictures/original/296547.jpg>.